

Pri kosta kaj multakosta

Jen kaj jen mi legas en internacilingvaj ĵurnaloj kaj periodaĵoj (be-
daŭrinde ankaŭ en Scienca Revuo), ke io estas **multekosta**. Laboro
kostas, nuntempe en la okcidentaj landoj eĉ multe, do ĝi estas "multe
kosta" aŭ "multkosta". Ĉu tiu **lasta vorto** vere devenas el la ofta
"multekosta"? En la "Ekzercaro", Zamenhofo rekomendis kunmeti
simple "la vortojn" (laŭ la germana versio), "la elementojn" (laŭ la
franca) kaj, pli konkrete, "la radikojn" (laŭ la angla versio).

Se PIV dokumentas la zamenhofan radikon "mult" kiel adjektivan,
tiam la "vorto / elemento / radiko" estas "multa", kiun ni rajtas kun-
ligi kun "kosta" al "**multakosta**". Aldone ni provas imagi la kreadon
de la kunmetaĵo el "kun multa kosto" same kiel "longdaŭra" el "kun
longa daŭro". Do la tradicia kunmetaĵo "multekosta" ŝajnas esti form-
ita **kontraŭ la reguloj** de la lingvo. Krome ĝi estus **escepto en ling-
vo laŭdire senescepta**.

Regule estas, ke oni kunmetu la "vortojn / elementojn / radikojn"
sen gramatika ŝanĝo. Ĉiu komencanto stumblas ĉe la esperanto-
interna kunmetaĵo kaj konscie aŭ subkonscie dubas pri la unueco de
la Internacia Lingvo. Nur longjaraj uzantoj estas harditaj kaj scias
trankviligi sian lingvan konsciencan per relativigaj elturnaĵoj...

*Franz-Georg Rössler
Am Mönchsbusch 6*

DE - 67373 - Dudenhofen / GERMANUJO

La solvo de la problemo pri propraj nomoj

Responde al la utila artikolo de prof. *Bociort* en SR 3/2003, p. 169
– 172: "Ĉu ankoraŭ esperantigi la proprajn nomojn?" mi verkis la
sekvajn proponojn:

A. Zoologio, botaniko, ŝtonscienco k.t.p.

1. Ni akceptu la tre malmultajn jam oficialajn terminojn por nocioj
uzataj en la ĝenerala vivo. Cetere ĉi tiuj Esperantaj vortoj **ne estas
propraj nomoj**. (cervo; ranunkolo; safiro; sulfuro).
2. Por la resto de tiaj terminoj ni uzu la grekaj-latinajn formojn, kiuj
ja **estas propraj nomoj**, en la latina ortografio, kaj sen prononc-
indikoj. (Abramis blicca; Eucalyptus miniata).

3. Nur se bezonataj, la Esperantistoj inventu kaj uzu, sed nur tre hezi-
teme, kiel komunnomajn neologismojn – kaj la Akademio eventuale
oficialigu – pliajn Esperantaj nomojn de ĉi tiu kategorio, kiuj nomoj
tiukaze estos **komunaj vortoj**. (pagelo; heliantemo; tantalo).

B. Nomoj de homoj

1. Ni akceptu kaj uzu la malmultajn jam oficialajn terminojn por
nefamiliaj nomoj. (Elizabeto; Johano).
2. La **familiajn nomojn** kaj la reston de la nefamiliaj nomoj (kaj, se
dezirataj, la jam oficialajn) ni uzu en la ortografio de la origina ling-
vo, sed ĉiam en latina literumo. (Chateaubriand; Vashti).
3. Ĉe la **etna termino** oni povas parenteze aldoni la prononcon, laŭ la
Fonetika Internacia Alfabeto, kaj nepre **ne laŭ la Esperanta alfabeto**
(kiu kreus stultajn sonojn: Gete, Kuri).
4. Nur se bezonataj, la Esperantistoj inventu kaj uzu, sed nur tre hez-
iteme, kiel neologismojn – kaj la Akademio eventuale oficialigu –
pliajn Esperantaj nomojn de ĉi tiu kategorio, inkluzive nomojn de
klasiktempaj personoj kaj kvazaŭpersonoj. (Karolusmagno; Kleo-
patro; Ateno)

C. Geografiaj nomoj

1. Ni akceptu kaj uzu la malmultajn jam oficialajn terminojn. (Franc-
ujo; Londono; Eŭropo).
2. La reston de la geografiaj nomoj ni uzu en la **ortografio de iliaj
etnaj lingvoj**, sed ĉiam en latina literumo. (Novosibirsk; Bei Jing).
3. La Akademio nuligu siajn listojn de konsilitaj nomoj geografiaj,
ĉar ili multfoje estas nelogikaj, ne Esperantecaj, kaj kelkfoje eĉ samaj
al jam ekzistantaj radikoj. (La-Plato; Kubo).
4. La nomoj de popolanoj, kiuj ja estas **komunaj nomoj**, ne havu
ĉefliteron, kaj ja havas la artikolon.
5. La Esperantistoj inventu kaj uzu kiel neologismojn – kaj la Aka-
demio eventuale oficialigu – pliajn Esperantaj nomojn por inter-
nacie multe uzataj geografiaĵoj, sub la kondiĉoj, ke
 - a) La nova termino konsistu el nur unu vorto (ja por nur unu nocio),
konsistanta el unu radiko (Laplato; Riodejanejro) aŭ pluraj radikoj.
(Nordameriko; Nigromontaro).